

INVITO AL BIBLIAJ TAGOJ KUN ADORU

Estimataj, mi ĝojas, povante inviti vin al novaj Bibliaj Tagoj 2015 kun libro *ADORU*.

La URBO: en centro de la bela silezia urbo Wrocław (iame Breslau), Pollando.

ALVOJAĜO: Estos sufiĉe facila per diversaj veturiloj kaj el diversaj direktoj. Ekzemple el Berlino ekzistas rektaj kaj komfortaj trajno-busoj; sed ankaŭ per aliaj eŭropaj trajn- kaj buslinioj, la urbo estas sufiĉe facile atingebla. Eĉ per aviadilo ekzistas sufiĉe malmultekostaj konektoj.

La TEMPO: La Bibliaj Tagoj 2015 okazos ĉi-jare en la dua semajno post Pasko, kiel kutime de merkredo vespere ĝis dimanĉo tagmeze. La dato estas: de la 15-a ĝis la 19-a de aprilo 2015.

La DOMO – mastrumata de humurhavaj fratulinoj apartenantaj al Kongregacio de Lernejoj Fratulinoj de Notre Dame, estas belega, freŝrenovita kaj eĉ historiĥava. Ĝi situas proksime de la katedralo. Loĝigo estas tie en dultitaj ĉambroj. Se vi serĉas interretan sinprezentadon, vizitu retpaĝojn:

www.ndwroclaw.com

CELGRUPO: Kaj la kvalito de la domo, kaj la situo de la domo kaj la urbo faras tiujn Bibliajn Tagojn interesaj por kaj orientanoj kaj okcidentanoj, por kaj maljunuloj aŭ nepaŝemaj homoj, kaj por junuloj. Invititaj estas kristanoj de ĉiuj konfesioj, sed ankaŭ homoj serĉantaj, kantemaj, ktp., kiuj havas iun malfermecon kaj intereson por la temo.

PREZOJ: Ni decidis fiksi prezon de 130 € por okcidentlandanoj kaj 90 € por orientlandanoj, ĉion ĝi inkluzivas. – Tia prezo vekus en okcidentaj landoj fortan dubon pri la boneco de la ejo, sed – ni estas en Pollando, kaj gastemaj fratulinoj ne unue havas ekonomiajn ambiciojn, sed subtenadon de valoraj spiritaj okazaĵoj.

TEMO: La temo de niaj matenaj prelegoj estos la t.n. Apokalipso (= revelacio, malkaŝo) de la apostolo Johano, do la lasta libro de la Biblio. Ĝi estas profeta libro bildoriĉa, kiu estas malfacile komprenebla. Sed ĝi en sia komenco deklaras “feliĉaj” (tiujn), “kiuj legos aŭ aŭskultos la vortojn de la profetaĵo kaj observas la skribaĵojn en ĝi, ĉar la tempo estas proksima.” (ĉapitro 1, versiklo 3). Ĝi estis skribita por la fruaj kristanoj, kiuj kredis la finon de la mondo jam

proksima. Sed la libro ne unue volas esti scenario de la mondo-pereo, sed kuraĝigo de la kristanoj de ĉiuj tempoj, elteni fidelaj al ilia kredo kun granda espero – eĉ en kazoj de ĝenerala malamikeco al ili flanke de la mondo, kaj eĉ en kazo de aliaj teruraj okazaĵoj kaj katastrofoj. La ĉielaj vizioj, kiuj ĉiam denove interrompas la mondan ĥaoson, ne estas nura espero por malproksima transa mondo. Male, la saviĝo en Kristo, pri kiu parolas la antaŭaj libroj de la Nova Testamento, en certa senco jam niatempas estas aktuala, reala kaj spertebla, eĉ se muĝus ekstera ŝtormo – kondiĉe, ke oni venu kaj restu proksime al Jesuo Kristo, la superanto de la malbono kaj la morto. Tio estas esperiga mesaĝo, eĉ en la plej malfacilaj cirkonstancoj – ĉu personaj, ĉu politikaj, kaj mi pensas, ke ĝia pritraktado helpas al ni en nia ĉiutaga normala vivo.

PROGRAMO: Krom la prelegoj, ni havos ĉiutagajn diservojn, preĝojn kaj kantojn el Adoru, turisman promenadon tra la urbo kun iom da renkonto de la loka kristanismo, kaj sufiĉe da tempo por amika kunestado.

EKUMENECO: Kiel kutime, la Bibliaj Tagoj estas ekumena aranĝo. La Biblio, kaj ankaŭ la plej multaj kantoj kaj preĝoj el Adoru interligas kristanojn el ĉiuj konfesioj. Tamen en la praktikado de la Sankta Manĝo, kaj aliaj neunaniamaj punktoj, ni senteme respektu la specifaĵojn de la unuopaj konfesioj. Dio helpas nin kaj benos, ke ni en interfrata amo kaj amikeco celebru lian vorton per aŭskultado kaj kantado, kaj ke ni – en la ankoraŭ nesolvitaj teologiaj demandoj – tamen respektu la nunajn staton kaj regulojn de nia eklezio. Eĉ tiel eltenante la nekompletecon de la eklezia unueco, estos multaj okazoj admiriri kaj konstati, kion kaj kiom la Sankta Spirito faradas en la aliuloj. Per tio ni certe faros etan kontribuon al la superado de antaŭjuĝoj, miskomprenoj kaj dividiĝoj. Tio estos vera progreso ne nur por ni persone, sed servo al la universala Eklezio, kaj al la Esperantlingva kristana komuneto.

Ĉiuj aliĝintoj ĝustatempe ricevos pli detalajn informojn, kiel en Vroclavo trovi lokon de la Bibliaj Tagoj. Do, mi refoje invitas ĉiujn interesitojn al kvar belaj tagoj en amika kaj spirita etoso en bela Silezio.

Via Stefan Lepping

Werl, 7.1.2015

stefanlepping@gmx.de

